## Babilada rondo

… okazos je la 19-a, vendrede …

**la 12-an de februaro**

ĉe Francisko Randin

Vallombreuse 14, Lausanne

021 647 29 17/ 076 411 14 55

**la 26-an de februaro**

ĉe …

… / …

**la 11-an de marto**

ĉe Monique Golaz

r. Ecole de Commerce 3, Lausanne

021 646 42 78 / 079 754 21 60

Ne forgesu aliĝi ĉe:

http://doodle.com/poll/8dk45bkb8brdf2nd#table

## Poemo

**LA VULPO KAJ LA KORVO**

*Flatate, gardu vian saĝon !*

La korvo, ŝtelis for fromaĝon
de ie, kaj por ties manĝo
sidiĝis sur tre alta branĉo.
La vulpo, kiu tre malsatis,
rigardis ĝin kaj jene flatis:
"Ho korvo ! Viaj plumoj brilaj !
Kie troviĝas do similaj ?
Kaj la vizaĝo, la staturo !
Vin vidi estas ja plezuro !
Se via voĉo estas klara,
vi vere estas senkompara !"
La korvo, por akiri plaĉon
per sia voĉo, grakis vante,
de l'bek' faligis la fromaĝon,
la vulp' ĝin portis for kurante !

Laŭ Ezopo kaj de la Fontano


## Laŭzana Esperanto – Societo

Poŝtfako – Case postale 246 * CH – 1000 LAUSANNE 22

+41 76 411 14 55 * +41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch

www.facebook.com/societedesperanto.lausanne

Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8

Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 – Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43

Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


# Laŭzana Esperanto-Societo

# Informilo

februaro 2016 – n° 2

**Lunde, la 1-an de februaro je la 20-a**

**kiel membro de LES,**

**vi estas kunvokita al la**

# Ĝenerala asembleo

ĉe Espace Dickens

rue Dickens 6, Laŭzano

**Lunde, la 7-an de marto**

*Venu kun lingvaj problemoj, demandoj gramatikaj aŭ aliaĵoj ne bone komprenitaj.*

**Lunde, la 4-an de aprilo**

*(decidota)*

**Lunde, la 2-an de majo**

*(decidota)*

**Sabate, la 18-an de junio**

*Ekskurso*

## 100-a Universala Kongreso de Esperanto

LILLO (Francio) 25 julio – 1 aŭgusto 2015

(2a parto ; vidu la unuan en la infomilo de januaro)

Dum la tuta semajno ĉiuj sekvis siajn dezirojn renkonti multe da amikoj, novaj kaj malnovaj, trinki kafon kune aŭ manĝi rapide por atingi ĝustatempe la deziratan programon, kelkfoje ripozi momente, aŭ partopreni kantatelierojn, aŭskulti prelegojn, admiri ekspoziciojn, ktp... Ĉiam ni havis senton esti membroj de la tutmonda familio.

Kelkfoje ne eblis partopreni aŭ spekti la deziratajn eventojn, ĉar la salono ne estis trovita aŭ jam plenplena, aŭ ni serĉis librojn kaj poste vicumis longe por pagi, aŭ parolis tro longe kaj havis malfruon. Vere ne eblas rakonti la senton de tiuj momentoj, kiuj vere estis gravaj por ĉiu E-isto.

Mercrede vespere nia nelacigebla Francisko organizis renkonton por la svisoj en ĉarma kaj agrabla restoracio Le Meunier. 20 personoj partoprenis ĝin. Ni profitis varbi por la koncerto de Manŭel la 4-an de oktobro en nia nova kunvenejo. Kaj oni proponis la viziton de nia venonta ekspozicio en la laŭzana urbodomo inter la 27-a de oktobro kaj la 7-a de novembro.

Ĉiutage aperis la Kongresa ĵurnalo « La Belfrido » nomata laŭ la granda turo de la urbodomo, 104 metrojn alta kaj klasifikita en la monda heredaĵo. En tiu gazeto oni povis legi interesaĵojn de la antaŭa tago kaj kio okazos hodiaŭ. Aperis eventoj, kiuj ne estis en la kongresa libro. Oni trovis la nomojn de la lastaj aliĝintoj. Estis tre interese legi novaĵojn pri la kongresa vivo.

Oni ankaŭ povis legis franclingve la regionan ĵurnalon « La Voix du Nord », kiu ofte rilatis pri la kongreso.

La tempo pasis tro rapide ĝis sabato, la 1-an de aŭgusto (mi komplete forgesis, ke estas nia nacia festo). En la kongresejo multe da personoj alvenis kun valizo kaj foriris tuj post la fermo de la ceremonio. Je la 10-a okazis la solena malfermo kun multe da paroladoj kaj la transdono de la flago al la urbestro de Nitra (Slovakio), kie okazos la UK-o en 2016. Dum tiu ceremonio okazis romantika afero, edziĝpeto de la prezidanto de Nitra, Peter Balasz, al sia koramikino.

La publiko multe aplaŭdis tiun momenton. La infana grupo kantis por ni kaj denove estis tre kortuŝe vidi, ke infanoj de la tuta mondo ludas kaj bone komprenas unu la aliajn. Post la kanto de nia himno jam estis la fino de tiu mirinda semajno. Multe da okuloj estis malsekaj.

Viaj 6 laŭzananoj tagmanĝis kune kiel ofte kaj dimanĉe matene foriris aŭtomobile al Lomme, 20 km for de Lillo por viziti Gent kaj Brugge en Belgio. La vetero ne estis tiel varma, sed ni ĝuis la viziton. Mardon ni vizitis Bulonjon ĉe Maro; la malnova urbo estas tre interese ĉirkaŭita de grandaj muroj. Antaŭ la malnova stacidomo ni emocie salutis la statuon de Zamenhof. En 1905 li eltrajniĝis ekzakte ĉi tie. Ni denove ĝuis la nordfrancan nutraĵon kaj kiel kutime ni tro manĝis. Veras, ke norde la temperaturo postulas tion. Ni promenadis borde de la maro, ĉu vi scias, ke Bulonjo estas la plej granda fiŝkapta haveno de Francio?

Hejmreveninte ni haltis en la vilaĝo « Bergues », kie oni filmis « Les Chtis »; kun plezuro ni spektis ekspozicion pri la filmo kaj rekonis la biciklon de la leterportisto, la poŝtoficejon, la grandan placon, ktp.

Mercrede matene estis la reiro al Lillo por reporti la rulseĝon al Parizo (pri tiu afero mi klarigos buŝe poste) kaj trajni al Laŭzano, kie ni alvenis je la 22-a .

Vere estis mirindaj memoraĵoj kaj spertoj. Mi povas diri, ke solidareco ne estas vana vorto en esperantujo. Francisko, Knud kaj Marie-Antoinette, Rosario, Gilberto, ĉiuj multe helpis min dum tiu periodo. Mi dankas ilin tutkore kaj bedaŭras, ke pro mia problemo ili ne povis ĝui tiun restadon kiel atendite.

Mi dankas vin pro via atento kaj deziras al vi ĉion bonan.
Eble ĉijare ni kune iros al Nitra, por ke vi povu sperti tiun senton, kiu ne estas facile komunikebla.
Memoru tiun kanteton de la famaj kantistoj de « Kajto » :

**EN ĈIU MOMENTO DE VIA VIVO**
**VI KREAS LA DIREKTON KAJ ENHAVON**
**DE ĈIU MOMENTO DE VIA VIVO.**

Charlotte Blanc Maillard